# *Kubo denuncas usonan kampanjon kontra? kubaj kuracistoj*



Havano, mar 17 (RHK) La kuba ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrígo Malmierca, denuncis la konstantan kampanjon de la usona registaro kontra? la kuba medicina kunlaboro kaj ties kuracistoj.

Per mesa?o en la socia reto Twitter, la ministro emfazis ke Usono senfrukte klopodas malpresti?i?i la internacian kunlaboron pri sano kaj asertas ke nuntempe, kontra? la nova kronviruso Covid-19, la insulo disponigas avangardajn medikamentojn kiel interferono alfa 2b kaj kelkaj landoj petis kuracistajn servojn kubajn.

La administracio de Donald Trump ekigis sian kampanjon de mensogoj kaj falsa?oj kontra? la kubaj kuracistoj pasintjare, situacio kiu devigis la sanlaboristojn nuligi sian laboron en landoj kiel Bolivio, Brazilo kaj Ekvadoro, kies ultradekstremaj registaroj taksis la kubajn profesilojn kiel instigantoj de perforto kaj konfliktoj en tiuj teritorioj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/216954-kubo-denuncas-usonan-kampanjon-kontrau-kubaj-kuracistoj

# Radio Habana Cuba